BULTENO

DE

# Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — N° 12 Aùgusto

## VOĈDONO POR KOMITATANOJ

*La enmetitan balotkarton oni plenigu kaj resendu antaù 15a de Oktobro.*

*S-ro Wolf deklaras, ke li ne akceptus reelekton. Li postulas, ke S-ro Deshays restu sekretario; tiu aliparte vane penis por trovi akceptontan anstataùanton; sed se li estus reelektata kaj restus sekretario, li farus nur la administran laboron, kaj nepre transdonus al aliaj la redaktadon de l'bulteno. La pligrandigon sen pliaj elspezoj ebligos klopodoj de S-ro Schoofs, en Antwerpena presejo; la reorganizo estos afero de la nova komitato.*

## EN BRUSELO

La UNIVERSALA KONGRESO DE LA LIBERA PENSO sukcese okazis en Bruselo 21-24 Aùg (tuj post la brulado en la Ekspozicio). Dimanĉe, sen pluvo, tra la homplenaj stratoj kaj sur la mirinda placo, la manifestado en honoro de Ferrer estis grandioze fervora. Antaù Sinjorino Soledad Villafranca, post emociaj paroladoj, nome de Profesoro Simarro el Madrid, aùtoro de historia studado pri la proceso de Ferrer, ŝtono estis metata je la loko mem, kie iam pereis grafoj D'Egmont kaj De Horn, kun surskribo kuniganta ilian memoron kun tiu de la nova martiro pafita en Montjuich, ankaù por la libereco de konscienco.

La kongreso mem estis interesplena, malgraù (ĉu ni plendos?) tedado de nekompreno, kaj tedado de tradukoj, tamen iafoje amuzigaj. El 25 nacioj ni recevis precizajn informojn pri libereco de Penso. De la Kuba delegito ni plezure eksciis, ke kun hispanaj monahoj foriĝis el la sanigita lando flavfebro, klerikalismo, kaj ĉiuj antaùjuĝoj eĉ pri raso kaj koloro! Sro Hins, la talenta Brusela veterano, legis raporton de Niemojewski, persekutata de l' juĝistaro, aùtoro de la katehismo kiun ni enpresis, lumige klarigantan ke Rusujo nun estas ne aùtokratio, sed polico. Plej elkovente Belga deputato Laurent klarigis, ke en Belgujo la katolika eklezio enskribigis en la leĝo ĉiujn liberecojn, kiujn ĝi mem ja bezonis (tie iu ajn rajtas malfermi edukejon, eĉ jam kondamnita pro atenco kontraù moroj), sed efektive ĝi tenas per devigantaj influoj ĉiujn personojn, eminentajn kaj mizerajn, en ilia situacio kaj materiala vivo. Itala sendito petis monhel-

pojn (tuj adresu moneron al nia sekretario, samideanoj!) por starigi en Romo dum la venonta jaro Domon de la Internacia Libera Penso.

La Bohemoj invitas la liberpensulojn en Praha 1915, por la 500-a datreveno de la morto de Jan Hus. Sed antaŭe en 1912 München gastigos universalan kongreson.

Fine ĝojiga estis la vizito al Raciista Orfejo, kie 70 knabetoj sane, nature kreskas por la liberigo de la penso kaj de la vivo. Nur tie, post energia sintenado, Soledad Villafranca, kiu jam kun la kara Mortinto estis vidinta la samajn freŝajn vizaĝojn, aŭdinta la samajn esperajn kantojn, dronis en larman doloron.

La Societo Esperantista, ĉe tiu bela kongreso (kies arta parto estis eĉ belega), kvankam ĝi ne sukcesis tuj alprenigi sian proponon, havis rolon ja satindan.

La Delegito, antaŭe alveturinte, estis tre esperige akceptata de la estraro de l' kongreso, precipe de la efektiva organizinto, la maljuna batalanto Jean Dons, kiu nun eklernas Esperanton, kaj ne ĉesis nin gvidi kaj favori. La renovigota Komitato ne rifuzos al li la titolon Honormembro. La seketario de l' Brusela Federacio, Sro Goebbels, aĉetigis per ni libron, kaj tuj pagis kotizaĵon. Oni vidos ĉisube listeton de aliĝoj kun la nomo de Sino Soledad. Inter la Kongresanoj estis jam sociatanoj Sroj Schoofs, Barend Schoen, kaj Deshays, kaj fariĝis Sro Iwansky, ruso loĝanta en München, kaj Sro Czubrynski el Krakow. Ĉeestis belga paroladisto Chapelier de longe klopodanta por Esperanto. Fine formiĝis grupeto, kiu altiris al si plej simpatian atenton kiel vivega ekzemplo de vera internacia fratiĝo.

Ĉe la malferma seanco, post ĉiuj delegitoj alportintaj la saluton de l' diversaj nacioj, la esperantista delegito per vortoj facile kompreneblaj diris en Esperanto alparoleton al la Kongreso, glorigon al *nia* Ferrer, kaj france instigis la liberpensulojn ekpreni la novan armilon, kiun jam uzis sukcese la Katolikoj. La ĵurnaloj konstatis la bonan impreson kaj aplaŭdojn, kiuj sekvis tiun esperantistan elmontron.

La Bibliografia Instituto nin provizis per disdonotaj propagandiloj, kaj je la lasta tago la nevenditajn broŝurojn Pledo por Ferrer ni donacis al ĉiuj delegitoj.

Kiel ni estis supozintaj, nia ĝenerala kunveno ne okazis pro nesufiĉa nombro de membroj, kaj anstataŭe fariĝis amika interparolo kaj varbado. La idista Belga Sonorilo vidinte sur ĵurnaloj anoncon nian, serĉas, en la Nro de 17a Aŭg., pri Liberpensuloj aliĝintaj al la fanatika esperantista sekto, kaj honeste supozas, ke ni estas tirataj de kelkaj samideanoj mone interesataj en la « sankta afero ». La sekretario sendis enpresotan respondon.

Nu alvenu al la administra seanco de la Federacio, merkrede matene, ĉe kiu estis presentata nia propono, jam sendita de nia Bohema honormembro Karel Pelant, delegito ĉe l' Kongreso kaj nia agema societano Fridrich. Niaj Bruselaj amikoj preskaŭ certigis nin pri la sukceso. Jen la teksto france legita, kun necesaj klarigoj, de la sekretario delegito de nia societo :

La Internacia Esperantista Societo LIBERA PENSO, aliĝinta al la Internacia Federacio de la Libera Penso,

Konsiderante, ke la internacia lingvo Esperanto ĉiutage en ĉiuj landoj grave progresas kaj povas efike helpi la liberpensan movadon; ke aliaflanke estas utile interesigi la Esperantistaron pri niaj ideoj kaj nia agado,

Konsiderante la multajn kaj gravajn maloportunaĵojn, kiujn alportas la diverseco de lingvoj al la diskutado ĉe la internaciaj kunvenoj kaj al la korespondado kun la societoj de ĉiu nacio,

Konsiderante, ke uzo de Esperanto povas tuj doni netakseblan helpon al la internaciaj asocioj pro sia facileco, precizeco kaj fleksebleco, provitaj per dudekjara praktikado de tre diversaj aplikoj kaj kvin universalaj kongresoj,

Denove prezentas al la Kongreso la proponon, kiu ne povis esti diskutata ĉe la kongreso en PRAHA (1907) pro manko de tempo :

1e AKCEPTI LA INTERNACIAN LINGVON ESPERANTO KIEL OFICIALAN HELPAN LINGVON EN LA DISKUTADOJ DE LA INTERNACIAJ KONGRESOJ DE LA LIBERA PENSO.

2e AKCEPTI LA UZADON DE ESPERANTO POR LA KORESPONDOJ DE LA KONSTANTA OFICEJO DE LA INTERNACIA FEDERACIO DE LA LIBERA PENSO, KAJ EN ĜIA JARLIBRO.

Por faciligi la aplikon de la dua deziro, la Esperantista Societo LIBERA PENSO komunikos al la Sekretariejo de la Federacio liston de korespondantoj en ĉiuj landoj tradukontaj de sia nacia lingvo en Esperanto kaj reciproke ĉiujn leterojn kaj dokumentojn por la Konstanta Oficejo.

Tiam leviĝis Sro Monseur, Idisto, aù pliĝuste memreformisto, dirante, ke pro la intereso mem kaj la graveco de la demando, ĝi ne povas esti solvata senprepare per delegitoj ne ricevintaj komision por tio. Kaj post insisto de la esperantista delegito pri la urĝeco de l' decido kaj la tuja utileco de fakte spertita lingvo, li flame ekatakis la malperfektecon de Esperanto. Sed la tempo mankis. La propono estis resendata al komisiono jam antaùe starigita por organizi konsiliĝon de la naciaj asocioj pri projekto de nova regularo kaj raporti la rezultaton al la venonta kongreso. Do nia propono sekvos la saman vojon. La komisiono konsistas el 5 membroj : Sroj O. Karmin, prezidanto, jam favorigita por ni de Sro Wolf en Svisujo ; Bazire, franca, tute por ni ; Ghisleri, kiun zorgu niaj italaj amikoj ; Vogtherr el Wiesbaden ; Frowein el Holando. Laù avizo de Sro Karmin, ni tuj sendos mallongan raporton presitan al la Komisiono kiu ĝin resendos ĉe la nacioj ; ĝin ni adresos ankaù al la societoj mem kaj al la delegitoj, kiujn ni konis ĉe la kongreso. Kaj ni rimarkigos (kion ni malfrue eksciis) ke mal regula estis la interveno de Sro Monseur, ĉar ne estante delegito de iu societo, li ne rajtis ĉeesti la administran seancon ; plie li ne estas senpartia en la demando, kiel aùtoro de *projekto* de lingvo. Ni profitas la okazon por proponi al ĉiuj liberpensuloj senpagan skriban Kurson de Esperanto.

Konklude, se ĉiu el ni agos ĉe sia lando, pli profita eble ol teoria alpreno estos tiu serioza, universala traktado de nia propono, kaj la kongreso en München 1912 ne nur akceptos, sed uzados Esperanton.

# NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Edgar JORIS, 19 Duifstr., Antwerpen, Belgujo.
S-ro Willem DOLLEZ, 76 S Janstr., Antwerpen.
S-ro Felix Van GANSEN, 115 Lange Nieuwstr., Antwerpen.
S-ro Eugeen Van DESSEL, 52 Van Beerstr., Antwerpen.
S-ro Alfons Van DESSEL, 52 Van Beerstr., Antwerpen.
S-ro Leopold VERBRAECKEN, 46 Lange Achteromstr., Antwerpen.
S-ro Joseph VERBRAECKEN, 46 Lange Achteromstr., Antwerpen.
S-ro R. RAJCZI, 13 Csonai u., Debreczen, Hungarujo.
S-ro Antonio CZUBRYNSKI, 3 Powisle, Krakow. Aŭstrio-Galicio.
S-ro D. IWANSKY, 28 Alramstr., München, Bavarujo.
S-ro Emilio BAEZ, 13 rue Montenegro, Saint-Gilles-Bruxelles.
S-ro W. HAMBURGER, Blaricum, Nederlando.
S-ro G. PETIT DISOIR, 67 rue de Quaregnon, Paturages, Belgique.
S-ro Ch. GOEBBELS, 89 rue du Tyrol, Saint-Gilles-Bruxelles.
S-ro D-ro Methedio MARANHAO, Goyanna (Pernambuco), Brazil.
S-ro Kunitaro TUKUTA, Senbaikyk-Sichchoj, Miyazaki, Hynga, Japanujo.
S-ino Soledad VILLAFRANCA, ĉe S-ro Nicaise, Hospice de la Salpêtrière, Paris.

*Eksigitaj* : Arnhold, Dupays, K. Klaŝka, Z. Klaŝka, Laporte, Riegel, Thomsen, Valente.

*Entute* : 136 membroj.

# KASO

| | |
|---|---|
| *Enspezoj*. — Reportite | 24.80 |
| Kotizaĵo de S. Roe | 2.95 |
| — Joris | 2.40 |
| — Barend Schoen | 2.50 |
| — Schoofs | 2.50 |
| — Czubrynski | 2.50 |
| — Iwansky | 2.50 |
| — Baez | 2.50 |
| — Hamburger | 2.50 |
| — Petit Disoir | 2.50 |
| — Goebbels | 2.50 |
| — G. Sebert | 2.50 |
| — Kunitaro Tukuta | 2.55 |
| Respondkupono por specimeno | 0.25 |
| Vendo de Broŝuroj Pledo p. F. | 5.65 |
| SUME | 51.55 |

| | |
|---|---|
| *Elspezoj*. — Sendo de la Juni-Julia bulteno | 9 »» |
| Poŝtmarkoj | 1 »» |
| Transporto | 1 45 |
| Afiŝo en Bruselo | 4 »» |
| SUME | 15.45 |

En kaso : Fr. 36.10 (Sm 14.30).
Ŝuldate al S-ro Bünemann Fr. 16.55.
al la presisto 18.10 = 34.65 (Sm 13.73).
Deponitaj broŝuroj 605, kartoj 80.

LASTHORE. En Antwerpen post parolado de S-ro Schoofs estas fondita Grupo Frateco de 25 Esperantaj Liberpensuloj kun S-ro Barend Schoen kiel sekretario.— El Washington ni ankoraŭ ne ricevis informojn.

Sekretario kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo
Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 Sm (Fr. 2.50)

Sens. — Imp. Ouvrière, 52, rue Thénard